**Fonduso Germain Pirlot**

ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

# 1 Celo

Fonduso por la akcelo de la eldonado en ILo (Internacia Lingvo Esperanto) de sciencaj verkoj laŭ la kriterioj de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS).

Neniel ĝi celas librojn, kies kerna enhavo apartenas al esperantologio aŭ interlingvistiko. Estas do ekskluzivigitaj vortaroj „nacilingvo-esperanto" (ekz. franca-esperanta vortaro) escepte de gravaj fakvortaroj (ekz. „pedagogia vortaro").

# 2. Organoj

La Senato de AIS estas la gvida organo de la Fonduso; ĝi povas starigi Prezidantaron de minimume tri personoj el inter siaj membroj por la prizorgado de la investoj kaj cele al la prezento de la jara spezokonto kaj buĝeto al la Senato.

# 3. Havaĵo

La kapitalo estas netuŝebla kaj konsistas el bazaj donacoj fare de la fondinto kaj aldonaj donacoj fare de aliaj personoj; krome 1/10 de ĉiuj interezoj estas atribuita al la baza kapitalo kun efiko je la 1-a de januaro.

La nomo de donacinto de minimume 5 AKU estos menciita en publikaĵo de la Fonduso.

# 4. Premio

La premio konsistas el minimuma sumo de 5 AKU kaj estas ĉiujare atribuota, por la unua fojo en 1993.

La verko estu prezentita al la Senato per alsendo de propono al la senata sekretariejo antaŭ la 1-a de marto. La Senato decidas dum la unua sesio post tiu dato.

Se pro malalta scienca nivelo la premio ne estu agnoskebla, la duono de la rento reiru al la kapitalo kaj la alia duono al la Subtena Sektoro de AIS.

# 5. Kondiĉoj

La verko estu originale verkita en ILo, eventuale en ILo kaj naciaj lingvoj, sed almenaŭ la duono de la tekstoj estu verkitaj en ILo.

La publikigo okazu en la kalendara jaro aŭ dum la kurantajaro antaŭ la prezento ĉe la senata sekretariejo. Publikigo de prespreta verko post la decido akcepteblas, sed tiam la premio estos pagata nur post la aperigo de la verko.

Estu minimume du kandidatoj, por ke la premio estu agnoskebla, krom en kazo de unika, sed altgrade elstara verko laŭ unuanima decido de la Senato.

Se la kondiĉo ne estas plenumita, verko el la koncerna jaro povas kandidatiĝi ankaŭ dum la sekvaj jaroj, ĝis kiam troviĝos almenaŭ du kandidatoj kun sufiĉa scienca nivelo.

# 6. Aŭtoro

La aŭtoro, aŭ la kompilinto (redaktinta eldonisto) devas esti AIS-ISK-ano (membro de la Internacia Sciencista Kolegio laŭ la regularo de AIS) dum almenaŭ 5 jaroj.

## 7. Rentumo

Se la enspezigita rento atingas minimume 20 AKU, tiam, post la aplikado de artikolo 3, 2/10 eniras la spezojn de la Subtena Sektoro de AIS, 7/10 estas destinitaj por la premio.

La fondinto garantias la ĉiujaran elpagon de minimume 5 AKU.

## 8. Likvido

En kazo de la likvido de AIS, aŭ se ĝi elektas alian planlingvon ol ILo por siaj translimaj kontaktoj, la kapitalo transiru al Universala Esperanto-Asocio, institucio laŭ nederlanda juro kun sidejo en Rotterdam (Nieuwe Binnenweg 176), Nederlando, aŭ al samcela organizaĵo, se UEA ne plu ekzistus, cele al la daŭrigo de la Fonduso G. Pirlot por la akcelo de la eldonado en la internacia lingvo Esperanto de sciencaj, teknikaj, artaj kaj ekonomiaj verkoj.

## 9. Ĝirkonto

Germana poŝtbanka konto Hannover 2051-305 (BLZ 25010030) de AIS, Kleinenberger Weg 16B, DE-33100 Paderborn, kun la mencio „Por Fonduso G. Pirlot“.

Oostende, oktobro 1997

Germain PIRLOT

---

AKU = Akademia Kotiz-Unuo, egala al € 65,00 en 2005.